

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

N-o 38, 26. Junio 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

Senpera Interkompreniĝo.

Grava politika okazintaĵo de la lastaj tagoj estis la konferenco de s-oj Loucheur kaj Rathenau en Wiesbaden. Ĝi estis la unua serioza provo atingi senperan interkompreniĝon inter Francujo kaj Germanujo por efektive praktika kunlaboro. Kaj ne sen sukceso. Antaŭ ĉio, la konferenco kreis taŭgan atmosferon por prospera kunlaboro; sed ankaŭ oni jam atingis praktikajn rezultatojn, kiuj esperigas, ke taŭga komuna plano por la rekonstruo baldaŭ maturiĝos kaj realiĝos. Kaj fine la komuna laboro de rekonstruado ankaŭ en aliaj demandoj alproksimigos la plej gravajn kultur-naciojn de l' eŭropa kontinento, kiuj nun per profunda, ŝajne ne transpontebla fendego estas disigitaj — ne nur je sia propra danĝero sed je tiu de la tuta kultura mondo.

Kiel la problemo de la rekonstruo komencis evolui, tiel devas evolui iom post iom ankaŭ ĉiuj aliaj problemoj, se ne ambaŭ landoj, Francujo kaj Germanujo, pereu. Germanujo ja donis lastatempe tiel nepridubeblajn pruvojn pri sia honesta volo, ke oni devas esti blinda por ne vidi ilin.

Ni devas fini eliri el la ĝisnuna netolerebla atmosfero de reciproka insultado, incitado, minacado, kalumnio, de malamo kaj venĝemo, alie la mondo neniam repaciĝos.

Antaŭ ĉio la esperantistoj devas forlasi sian nacian ŝovinismon. Ekzistas ankoraŭ sufiĉe da samideanoj inter francoj kaj germanoj, aŭ inter ĉeĥoj kaj germanoj, aŭ inter aliaj popoloj, kiuj rifuzas interrilati kun samideanoj de la alia nacio.

Esperable nia XIII-a Kongreso en Praha bonefikos sur la tutmondajn interrilatojn de la esperantistoj, precipe sur tiujn de la germanaj kaj ĉeĥaj samideanoj, por ke la hodiaŭ parte ankoraŭ ekzistanta malŝado kaj la resto de ŝovinismo nestiĝinta el la milita tempo, tute malaperu inter la esperantistoj per la senpera interkompreniĝo de nacio al nacio, de homo al homo.

R-ano.

Esperanto kaj Politiko.

En la lastaj numeroj de ET oni kelfoje publikigis opiniojn, laŭ kiuj en la esp. ĵurnalaro oni devas aŭ eviti la politikon aŭ nur priskribi politikajn aferojn, kiuj okazis en la propra regiono, sekve ne pritrakti la tutmondan politikon. Tio ŝajnas al mi nepre malprava. Esperanto estas unue populara afero. Ĝi volas disaltigi la obstinajn barojn kaj ne laciĝi, ĝis la bela sono de l' homaro

efektiviĝos. Jen jam en nia himno la programo de nia politiko. La laboro de la esp. politikistoj estas observi la agadon de la naciemaj ŝtatestroj kaj okaze pruvi, ke ili multfoje ne estas kapablaj nur pro tio, ke ili ne komprenis kaj akceptis la esp. ideojn. Pri Supra Silezio kaj tiaj delikataj aferoj la esp. ĵurnalisto nur raportos la okazintaĵojn evitante diskutojn aŭ almenaŭ farante ilin tre singardeme.

Okaze de la Krakova kongreso aperis en esp. ĵurnalo artikolo, en kiu la aŭtoro pruvis, ke nur la enkonduko de Esperanto kiel ŝtata lingvo povus savi la aŭstrian ŝtaton. Sendube eĉ multaj esperantistoj tiutempe mokis pri la „utopio“. Dume la tuta aŭstria ŝtato fariĝis utopia, kaj la tiamaj aŭstria ŝtatestroj, legante pri tiu propono, estonte ne piridos ĝin, sed diros al si mem: Nekredeble, ke ni ne trovis aŭ akceptis tiun simplan solvon.

Kaj kiom da perspektivoj alportas la nuna politika situacio al la esperantistoj! Tuj post kiam aperis en ET la artikolo „Restarigoj“, Lloyd George faris la porgermanan paroladon pri Supra Silezio, kaj freŝdate Churchill favore parolis pri amikaj rilatoj inter Anglujo, Germanujo kaj Francujo. En Franclando oni ekmalatidis la anglan politikon, ĉar evidente ĝi deziris anstataŭi la francan amikecon per la germana. En la franca parlamento oni diris, ke la germana ŝtonkarbo kaj la franca fero apertenas unu al la alia. Kvankam eble la nelaciĝanta laboro de nia diligenta kolegaro legis tiun artikolon („Restarigoj“) al eminentaj politikistoj, tamen oni apenaŭ asertis, ke ET eble tiom influis en la politiko, sed sendube ET komprenis la estiĝintan politikon pli frue ol la naciaj gazetoj, kiuj venis, kiel la germano diras, unu poŝtagon tre malfrue.

La pritrakto de tiu ŝanĝo en la politiko flanke de la naciema ĵurnalaro estas iuda al la antaŭaj eraroj. Ekzemple la fama angla politika ĵurnalo „Observer“ ĝojas, ke la „danĝero“ de interkonsento inter German- kaj Franc-lando ne ekzistas, dum Briand estras la politikon. Ĝi plendas, ke en Franclando ekzistas homoj, kiuj proponas redoni al Germanlando Kameronon por disponigi agadkampon al la laborema germana loĝantaro. Alianco inter Germanlando kaj Franclando estus fatala al Franclando, ĉar frue-malfrue Germanlando venĝus sin kontraŭ sia „malamikigo“.

Kelkriate la „Observer“ estas prava: La du landoj farante aliancon eble insideme atendus la momenton, kiam oni povus malligi la interrilatojn, pro tio nur unu uĝo de la du landoj povus nepre malaperigi la malamikajn. Sed aliflanke la „Observer“ montras per tiu artikolo, ke li estas

ano de la malnova angla diplomataro skolo, kiu volis ĉiam semi malamikaĵojn inter la popoloj de la eŭropa kontinento. Kontraŭe Lloyd George estas oportunema politikisto; eĉ nur sententante, ke esp. politiko estus enkondukota sur la kontinento, li tuj kunlaborus ŝanĝante la malnovan anglan sistemon.

Anstataŭ profiti el tiu okazo, multe da germanaj kaj francaj ĵurnalistoj avertas, ke oni ne delogatiĝu per la alia partio; per tio ili nur evidentiĝas, ke la malnova angla politiko estas prava.

Kiom blindaj estas la fakaj politikistoj rilate al esp. ideoj, tion montras artikolo de alfranga germana oficisto de la eksterlanda oficejo. Li plendas, ke la ambasadoroj kaj konsuloj, ne povante minaci per la impona armeo kaj nur pagante per malmultvaloraĵaj papermoneroj, tute ne influas. Plue li plendas, ke nun la triono kaj eble en mallonga tempo la duono de la ekzistantaj germanoj vivas transe de la germanaj limoj, kaj ke la reprezentantoj de Germanlando tute ne povas plenumi la taskon ŝirmi ilin.

Sed ke la germana registaro devus forsendi fremdlandan kiel ambasadorojn kaj konsulojn plejble multnombre nur bonajn esperantistojn, tiu simpla ideo tute ne venas al ĝia kapo. Tiuj reprezentantoj, posedante sperton en modernaj ideoj, invitus la esperantistaron de sia gastiganta lando, ili farus esperantajn vesperojn kaj festenojn en siaj salonoj, kio kostus malmulte, kaj iom post iom ili fariĝus en la fremda lando ne allasatoj sed posedantoj de iom da potenco kaj influo. La fremda registaro ne riskus malbone kondukti je ili, ĉar tiuokaze la tuta esperantistaro de la rilata lando kaj eble la universala esperantistaro protestus. Kio estas tiam pli intensa, post kiam oni volas akcepti Germanlandon en la Ligon de Nacioj.

La oficejo en la Wilhelmstrato de Berlin multfoje sendigas al la germana gazetaro artikolojn, per kiuj ĝi volas pruvi, ke Germanlando suferas multe da maljustaĵoj flanke de la Entento. Laboro eble por ĝi necesa, sed tute ne fruktodona. Ĝi devus elirigi tiujn artikolojn per ĉiutaga Esperanta ĵurnalo abonata per la fremdlanda esperantistaro por tre malgranda sumo, ĉar multfoje pli grave estas sendi tiujn sciigojn fremdlandan ol enlandan. Ĉiu registaro, kiu farus tiajn paŝojn, gajnus multajn profitojn. Sed ne timegu, la ofica-oficiala ĉevalo ne ŝatas tiajn vojojn, kaj la esperantistaro devas esti kontenta, se ET sin okupas nur pri politikaj aferoj en Esperantujo kaj rekompence en tute senpartia maniero.

Observanto.

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.
Tradukis laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro
Maria Ŝidlovskaja.

(26-a daŭrigo.)

Dankon al Dio! Ili troviĝas en la loĝejo de la maljuna sinjorino, kiu dungs Anna'n.

Ĉio plaĉis al Mateo en tiu loĝejo. En la unua ĉambro staris tablo, kovrita per tablotuko, en la apuda vidiĝis lito sub litkuteneno, en angulo — granda konata sanktpentraĵo de Dipatrino el Poĉaev, kiun en ilia lando egale adoras katolikoj kaj grek-ortodoksuloj. Post la sankta pentraĵo estis enŝovita vaksa kandelado kaj fasko da sekaj branĉoj. Kvankam ne salikaj branĉoj tio estis, tamen oni vidis la deziron konservi rusan kutimon²¹⁾. — kaj varmon eksentis Mateo en sia koro! Tial li ree metis la manon post la zono kaj tre fiere alrigardis la junan hebreon... Sed tuj li devis humile kliniĝi preskaŭ ĝis la tero, ĉar en la ĉambro eniris la sinjorino, jam vestita, kun okulvitroj sur la nazo, kun trikajo en la manoj. Ŝi aspektis trankvila, eĉ majesta, tiel ke al Mateo estis strange pensi, ke li ĵus estis vidinta ŝin lavanta la plankon. Ŝi sidigis, finis kalkuli la maŝojn, ekiris la triklon tien kaj reen kaj diris al la humile atendantaj Mateo kaj Anna, tute ne atentante John'on:

„Nu, kion vi diros?“
„Ni venis al via sinjorino Moŝto,“ respondis ambaŭ unuvoĉe.
„Ŝajne, via nomo estas Anna?“
„Jes, via sinjorino Moŝto.“

²¹⁾ En la antaŭpaska dimanĉo, je memoro de la eniro de Kristo Jeruzalemon, en preĝejo estas sanktigataj salikaj branĉoj (anstataŭ palmoj); el la preĝejo oni kunportas ilin hejmen kaj konservas dum tuta jaro.

„Kaj via — Mateo?“
Sur la vizaĝo de Mateo vidiĝis ĝojplena rideto.
„Kie estas via tria kunulo?“
Mateo svingis la manon.

„Ha! Mi ne scias, kion diri al via Moŝto...
Li prenis oficon aŭ ion alian... ĉe ĉi tiea Tammany-Hall...“

La sinjorino plenkompte balancis la kapon.
„Bona sinjoreto, — certe, bona! Kanajlara bando!“

„Ho, mia Dio!“ ekĝemis Mateo.
„En ĉi tiu lando ĉio fariĝas male,“ daŭrigis la sinjorino. „Ĉe ni tiajn kanajlojn oni metas en malliberejojn, ĉi tie ili inter siaj kunuloj, la samaj friponoj, elektas urbestrojn, kiuj igas la honestulojn pagi impostojn...“

Mateo rememoris, ke ankaŭ Dima partoprenis en la elektado de la urbestro, kaj li ree ekĝemis.
La trikliloj en la manoj de la sinjorino ekkuris ankoraŭ pli rapide; vidade ŝi koleteris.

„Nu, kion nun vi diros al mi, mia kara?“ demandis ŝi tiel akre, sin turnante al Anna. „Ĉu vi volas dungigi aŭ, eble, vi ankaŭ serĉas por via Tammany-Hall?“

„Ŝi estas honesta knabino, via Moŝto,“ interrompis ŝin Mateo.

„Ha! Dum la 20 jaroj ĉi tie mi vidis multajn honestajn knabinojn, kiuj post la paso de unu jaro, se ne pli frue, pereis en ĉi tiu malbenita urbo. Komence ili estas knabinoj, kiel decas: kvietaj, modestaj, obeemaj, diotimaj, — bone laboras, respektas la gemaŝtrojn. Poste... Oni vidas, la knabinoj iĝas afektaj, ornamas sin per rubandoj ktp. kiel kornikoj per pavaj plumoj, — poste ili deziras havi pli grandan salajron, poste ili pretendas bezoni ripozon dufoje en semajno... kaj fine — ili deziras, ke la mastro al ili servu... ke ili mem sidu, kunmetinte la brakojn...“

„Gardu nin Dio! kie estas vidata io simila?“ indignis Mateo.

La juna John sidis sur la seĝo kun etenditaj piedoj kaj kun enpoŝigitaj manoj, havante la aspekton de homo, kiun tedas la interparolado.

„Nu, la diablo ne estas tiel terura, kiel oni lin pentras,“ li diris.

La sinjorino ĉesis triki kaj senparole fiksis siajn okulojn sur John, kiu senĝene levis la kapon al la plafono, kvazaŭ observante tie ion interesan. Dum kelkaj sekundoj regis silento. In sinjorino kaj Mateo riproĉe rigardis la hebreon; Anna ruĝiĝis.

„Kaj kia estas la kaŭzo?“ la sinjorino rekomencis tute trankvile. „Ĉar en la lando for- estas ordo.“ Ĉi tie hebreo Berko jam estas ne Berko, sed Mr. Bork, lia filo Josjka fariĝis grand-sinjoro John!...

„Vi estas tute prava,“ diris Mateo plenkonvinke.

„Ĉu vi aŭdas, Anna?“

La knabino mire rigardis Mateon, ruĝiĝinte ankoraŭ pli forte: ŝajnis al ŝi, ke, kvankam John efektive estas hebreo kaj kondukas nun iom arrogantan, tamen trakti lin tiel senceremonie estas nedec.

„Jes, ĉio nun intermiksiĝis kiel sur la Nuda Monto²²⁾,“ diris plue la sinjorino. Prave diras mia konatulo: ĉi tiu nova mondo estas kvazaŭ forsaltinta de l' ĉarniroj kaj flugas al la infero.“

„Vi parolas sanktan verojon!“ jesis Mateo.

„Mi vidas, ke vi estas homo prudenta,“ diris la sinjorino indulĝe: „vi komprenas ĉi tion. Ĉu io simila okazas ĉe ni? Nu, diru! Nia malnova mondo staras tute trankvile... la homoj tie konas sian pozicion: hebreo restas hebreo, vilaĝano — vilaĝano, sinjoro — sinjoro. Ĉiu humile akceptas tion, kio por li estas destinita de Sinjoro Dio... La homoj vivas kaj gloras Dion...“

(Daŭrigo.)

²²⁾ Monto apud Kiev: laŭ popolo kreda loĝejo de sorĉistinoj.

Opinioj pri Esperanto.

Belga Generalo Leman,

eks-direktoro de la Belga Milita Lernejo, guberniestro de Liège je la komenco de la milito, kies heroo konduko estis rekonata de liaj kontraŭuloj, generalo Leman estis homo, kiu tutan sian vivon studis. Neniu fenomeno de la vivo de la civilizita homaro ne estis konata de li. Delonge simpatianta por Esperanto, li akceptis en majo 1920, malgraŭ la idistaj klopodoj, la honoran prezidantecon de la Belga Ligo Esp., kiun li konservis ĝis sia morto. Li ankaŭ akceptis la titolon de la honora prezidanto de la Societo de Amikoj de Esperanto en Parizo. Lia morto estis grava perdo por Esperanto en Belgio.

Jen estas opinio skribita de li en lia antaŭparolo al la libro „La Belgique Commerciale et Industrielle“ („Industria kaj komerca Belgio“) eldonita en 1920 de la SOCIÉTÉ BELGE D'ÉTUDES ET D'EXPANSION (Belga societo de studoj kaj disvastigo), grava asocio sub la protekto de reĝo Alberto, en Liège:

Oni ne komprenas, ke la ideo, krei tian ilon de disvastigo, ne kunigis ne sole ĉiujn voĉojn, sed ankaŭ la plej seriozajn pensojn de ĉiuj agemaj homoj. Kiam oni komparas ilojn de agado; kiel vaporo, elektron, aviadon centobligintajn la valoron de procedoj, helpe de kiuj disvastigas la ideoj kaj estas traktataj aferaroj inter la plej malproksimaj popoloj de l' universo, oni restas miregita, ke la homaro postulanta tion de unu flanko, estas aliaflanke tiel ribel-ema, kiel ĝi estas al la ideo unuigi la lingvon. Kaj tamen ĉi oni ne vidas kun la klareco de l' evidenteco, ke ĉiu paŝo antaŭen al la unuigo de la lingvo valoras mil paŝojn da progreso realigita en ĉiu alia direkto.

La eltrovaĵo de Zamenhof estas, el vidpunkto de monda disvastigo, la plej granda de ĉiuj; ĝi estas destinita renovigi la universon el ekonomia vidpunkto kaj multobligi per senlima koeficiento la produktadon de la mondo. Oni neniam komprenas, kial la nacioj ne faras al si la ordonan devon propagandi la scion de la helpa lingvo devige, ne ekzameante, ĉu konvenas al ili aŭ alia studento sekvi ĝian kurson.

Ĉi tiu indiferenteco estas vere korpema kaj pravas ankoraŭ pli ol la militoj la abomenan barbarecon, en kiu ankoraŭ enigas la homaro.

Estas necese, ke la XX-a jarcento malaperigu herezon tiel kriman.

Komercaj ĉambroj.

La komerca ĉambro de Tarare (urbo de Lyon'a regiono kun 12000 loĝantoj, muselina fabrikado) aliĝis al la rezolucio de la Pariza komerca ĉambro, dank' al ĝia ĝenerala sekretario, nia nelacigbla propagandisto s-o Cherblanc. Por ke ĉiuj francaj komercaj ĉambroj (Chambres de Commerce) estu konvinkataj pri Esperanto, eksterlandaj samideanoj bonvolu peti de ili komercajn informojn pri Esperanto.

Ankaŭ la komerca ĉambro de Beauvais (elp. Bove) aliĝis al la decido de la Pariza komerca ĉambro. — Beauvais estas ĉefurbo de departemento Oise (elp. Uaz), norde de Parizo, je 79 kilometroj, 20000 loĝantoj. Ŝufabrikaĵo, tolo kaj tapiŝfabrikado, en kiu laboras tre spertaj artistoj, laŭ pentraĵoj de konataj francaj pentristoj.

Du francaj eksterlandaj komercaj ĉambroj, tiuj de Milano kaj Torino (Italio) aliĝis, kiel

La hodiaŭa stato de Esperanto

de Karlo Minor.

(Daŭrigo.)

Se oni legas la verkojn de la komenca epoko de nia literaturo, oni vidas ke la sufikso „ad“ fiam havis multe pli vastan senceon ol hodiaŭ. Eble, komence, oni devis substantivigi verbojn ĉiam per „ado“ anstataŭ per simpla „o“. Sed hodiaŭ „ad“ nur signifas „seninterrompe longdaŭra agado“ kaj ne „ofte ripetata ago“. Tio signifas ke, tiel same kiel mi devas supozi „seninterrompe longdaŭran agadon“ kie mi aŭdas aŭ legas „ad“, mi ankaŭ devas meti „ad“ nur tiam kiam mi volas esprimi „seninterrompe longdaŭran agadon“. Pro tio, se, dum kongreso, iu faras bonan „paroladon“ pri la homa naturo, certe ĉiuj kongresanoj poste „parolis“ pri ĝi. Sed la persono, kiu „seninterrompe longdaŭre“ parolis pri la objekto, pri ĝi „paroladis“! Tial (206/25) la vorto „paroladis“ devus esti metata anstataŭ „la sekvantoj personoj parolis“ pri la sekvantaj objektoj“. Aliflanke, la uzo de „ad“ por „ofte ripetata ago“ estas malĝusta. Sekve „ad“ devus esti ellasata en la sekvantaj frazoj: „li ĉiam diradis al mi la veron“ (6/21), „oni ĉiam diradis“ (19/18), „li ĉiam kun plezuro lin akceptadis“ (73/8), „kiam Swift prenadis novajn servantininojn“ (73/25), „la ŝipestro prenadis kaj transdonadis“ (216/7). — Se „ad“ nur signifas „ĉiam“ aŭ „ĉiujfoje“ oni uzu tiujn vortojn kaj ellasu „ad“. Malkorekte do ankaŭ estas diri: „ili ekvidadis la nubojn“ (55/9). Klaraj modeloj por la korekta uzo de „ad“ estas: „kiam Napoleono aliradis al Parizo“ (85/16) kaj „elportadi ĉiujn batojn“ (30/16). — Pro tio (aŭ tamen) vortoj kiaj „pafado“, „kriado“ ktp. estas korektaj, kvankam ili ŝajne ne estas „seninterrompaj agadoj“. Se mi pafas, forprenas la ingon de la kugleto, tuj ree pafas, ree

honoraĵ membroj, al la societo „Komerc kaj industrio per Esperanto“, kies celo estas propagandi Esperanton en la francaj komercaj rondoj.

Antaŭ kaj post Praha.

Kongres-Karavana Kunveno en Frankfurt a. M.

Gesamideanoj kaj karavanoj el Nederlando, Francio, Hispanio, Portugalio, Belgio kaj Anglio travojaĝantajn Frankfurton ni invitas por kunveno aranĝota de ni merkredon la 27-an de julio 1921. La 27-an kaj 28-an de julio ni aranĝos gvidadon tra la bela urbo Frankfurto. Bona okazo por kunvojaĝo al la Dresena Antaŭ-Kongreso aŭ rekte al Praha. Pro detaloj oni skribu al s-o. C. Barthel, Frankfurt a. Main, Wöhlerstrasse 14.

Postkongreso en Budapeŝto.

Kiu volas partopreni la Postkongreson en Budapeŝto (9.–10. aŭgusto), anoncu sin jam nun, petante loĝojn, pli malkaran ŝipbileton, kaj ordigisian pasporton ankaŭ por Hungarujo. Kiu povas per la prezentadpunkto partopreni la kabared-vesperon, bonvolu sin anonci por prepari antaŭe la programon. Cetere estas jam preta programo por ambaŭ vesperoj. La duan vesperon estos teatraĵoj.

La karavano iros el Praha tra Bratislava (Pozsony, Pressburg) per komforta ŝipo sur la Danubo.

Lizu la okazon viziti la ĉefurbon de Hungarujo! Vidu per propraj okuloj, ke en Budapeŝto estas kultura vivo, moderna trafiko kun emo al progreso kaj homara kunlaboro. Kotizajoj: la duono de tiuj por Praha. Adreso: A. Laquer, Budapest VII, Kiraly u. 57-II-2.

La Programo de Germ. Esp. Grupo Reichenberg.

Post la oficiala fermo de la Praha kongreso, la partoprenantoj veturos tra la plej belaj partoj de Bohemio ĝis Reichenberg. Alveno en Reichenberg la 13-an de aŭgusto vespere. Solena akcepto kaj komuna vespermanĝo. Poste la fremdaj gesamideanoj estos gvidataj en iliajn dormejojn.

La 14-an matene je la 9-a horo estos kunveno antaŭ la urbdomo, piediro tra la urbo en la meiomuzeo, je la 11-a horo kunsido en la festĉambrego de la palaco de l' komerca kaj metia ĉambro; ĉi tie la gesamideanoj estos salutataj de la urbestro, de la foira estraro, industriistoj kaj aliaj reprezentantoj. Poste komuna tagmanĝo. Posttagmeze komuna vizito al la foiro. Je la 8-a horo vespere amika kunveno en la ĉambrego de „Volksgarten“ (popolĝardeno), kie estos aranĝata festeno, koncerto, kanto, teatraĵo ktp.

La 15-an antaŭtagmeze rondiro tra la urbo por rigardi la vidindaĵojn. Posttagmeze vizito al la monto Jeŝken.

Poŝto.

En Nürnberg 80 poŝtofcistoj depost aprilo lernas Esperanton de 4 kursoj. La supera poŝtdirekcio disponigis por tiu celo unu el siaj salonoj.

Fervojo.

La fervoja direkto de Nürnberg komunikis al la Esperanto Kartelo, ke ĝis nun sin anoncis 92 oficistoj por la esp. kursoj, kiuj komenciĝos la 1-an de septembro.

forprenas la ingon, denove pafas ktp., mi ne seninterrompe pafas, sed la agado necesa por la kiom eble plej seninterrompa „pafado“ tamen okazas. Same, kiam mi krias kaj spiras por tuj krii denove ktp., tio ankaŭ fakte estas „seninterrompa agado“ por la efiko esprimata per la radiko „kri“.

Ankaŭ la sufikso „et“ hodiaŭ ŝajne havas plimulte klarigitan signifon ol en la komenca epoko. „et“ estas aplikata, se oni volas esprimi „pli malforan etikon“ de vorto. „et“ ne „plimalgrandigas“! Oni do povas uzi „et“ ne nur pri „grandaj objektoj“ kiel „domo“ — „domeito“, sed oni ja ankaŭ diras „fali“ — „faleti“. Se mi havas du blujajn ŝtofojn de kiuj unu estas „sate“ blua kaj la alia de la dua estas „malpli forte“, ĉi tiu lasta estas „blueta“. Se mi ridas „malpli forte“ — mi „ridetas“, kaj se mi parolas „malpli forte“ — t. e. malpli laŭte! — mi „paroletas“. Jen la vorto Esperanta por la tiom serĉata Germana vorto „flüstern“ (A.: whisper, F.: chuchoter), kiun multaj tradukas per „sufiori“, kaj aliaj verkistoj per nova vorto „flustiri“, kiu lasta tute ne estas necesa.

La signifo de „kun“ kaj „kune“ estas tute klara laŭ Universala Vortaro, kaj ĉiuj vortoj ne estas kaŭzo de erarkompreno, kiam ili estas uzataj kiel memstaraj vortoj. Sed se oni volas „kunetiri“ ilin kun alia vorto, oni devus atente fari diferencon inter „kun“ kaj „kune“. En la tuta F.K. nur du kunemetitaj de „kune“ estas korektaj: „oni kunemidigis“ (145/23) kaj „li kunerompadis la manojn“ (55/20). Se „ruso kaj tataro veturas kune“ (90/8), la ruso „kune veturas“ kun la tataro kaj unu „kunveturas“ kun la alia. Se la filo venas „kune kun la patro“ (2/4), la filo „kunvenas“ kaj ili ambaŭ „kune venas“. Kaj se, sur la bordo de la lago Chautauque, la anoj de la Internacia Universitato volas „kuneveni“, unu povas instigi alian al „kunveno“, multaj „kune venas“ kaj ĉiuj tiuj „kunevenas“, ĉar okazas „kunveno“, sed ne „kunveno“ (205/17). Se mi havas amason da

Laboristoj.

La Federacio de la Laboristoj de ŝtato Ceara (Brazilio) akceptis la 19-an de aprilo rezolucion favoran al Esperanto. Per ĝi la federacio utiligos Esperanton en siaj internaciaj interrilatoj, konsilas la lernadon de Esperanto al ĉiuj federaciaj asocioj, donas sian apogon al la VI-a Brazilia Kongreso de Esperanto, ktp. (Laŭ „Voz do Graphico“, Fortaleza.)

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Esperanto en la Internacia Kongreso de Komercaj Lernejoj.

Dum ĉi tiu kongreso okazinta en Lyon en la fino de majo s-o Drudin, nia fervora Lyonsamideano, prezentis raporton pri Esperanto. La diskutado okazis la 1. junio. La ĉefaj diskutintoj estis s-o Giacomino (italo) kaj unu holanda delegito de Amsterdam, parolintaj kontraŭ Esperanto. S-o Pagnon (franco) parolis por la instruado nur de principoj de Esperanto, komparante la lingvon al la skribmaŝino. Estis voĉdonata rezolucio pri la dezirindeco de instruado de principoj de Esperanto en komercernejoj. Malgraŭ la nebuloco de la formulo, la unua paŝo farita de Esperanto estis tre kontentiga. Ĉiuj lokaj gazetoj raportis pri la fakto kaj „Le Sud-Est“ de la 3-a presigis tre favoran artikolon citante la decidon de la pariza komerca ĉambro kaj la rezolucion de la akademianoj.

La devo de ĉiulandaj samideanoj, laborantaj en ĉi tiu fako, estas labori por la propagando de Esperanto dum la venontaj kongresoj.

Centjara Datrevena Festo de la „Societo por Paco“

okazis en Londono la 14-an de junio, sub la prezido de Lord Parmoor.

Diversaj proponoj pri paco estis akceptataj de la partoprenantoj kaj sendotaj al la registaroj.

Inter la parolantoj estis s-o Henri La Fontaine, senatano belga, dufoje gajninto de la „Nobel“-premio por paco, kiu konatigis sian programon por atingi veran internacian pacon: Unu el liaj ĉefaj argumentoj estas la neceseco de Internacia Lingvo: la sola taŭga estas Esperanto. Lia diro pri nia lingvo estis pli favore akceptata ol la raportisto esperis, laŭ la aplaŭdoj ricevataj de la paroladisto.

El Koblenz (Germ.).

La 3-an de junio fondigis interne de la loka grupo perfektiga rondeto laŭ la regularo de „Eoro“ (Esp. Ora Rondeto), en kiu oni parolas sole Esperante. Alparatenas niaj membroj. — Dum la nokto de l' 25-a ĝis 26-a de junio la grupo partoprenos solistan feston sur „Fleckerstühne“ (altaĵo), por kiu membroj el najbaraj grupoj estas bonvenaj.

Pri la movado en Irkutsk.

La esp. societo de Irkutsk estas fondita dum marto 1917 tuj post la revolucio. De tiam ĝi agado ne ĉesis malgraŭ nefavoraj ekonomiaj kondiĉoj. Seninterrompe okazis kursoj en nia lingvo. La lastan kurson komencitan en januaro nunjara aliĝis 173 personoj. La societa vivo ankaŭ estas vigla: kunsidoj, raportoj kaj koncertoj okazas. La societanoj ofte povis praktiki nian lingvon kun germanoj, hungaroj, ĉeĥaj, kiuj por konataj kaŭzoj „gastis“ en nia lando. Kromaj internaciaj rilatoj tute mankis. Nur nun, kiam la paca vivo en Ruslando komenciĝis, ni esperas

paperaĵoj, leteroj ktp. kaj almetas certan telegramon, ĉi tiu telegramo estas la „kunmetita telegramo“; sed se mi elektas la ĝustajn vortojn por skribi telegramon, mi, per tiuj „kunemeltaj“ vortoj, verkas „fiel kunemetitan telegramon“, sed ne „kunmetitan telegramon“ (85/10)! Se oni volas „fortiri“ aŭ „forporti“ ŝtonon kiu estas tro mudepeza, oni povas peti min „kunfiri“ aŭ „kunporti“; sed se ŝnuro estas kudrita en la supran randon de sako por fermi la sakon, jen „ŝnuro kiun oni povas kunetiri“, sed ne „ŝnuro kiun oni povas kunfiri“ (219/28). Laŭ ĉiuj klarigoj estas malkorekta la sekvantaj frazoj: „la pupiloj atingis sian plej mallargan kunfiriĝon“ (179/5), „kunĝui, kunpremi“ (180/9), „kunmeti regulojn“ (194/33); la ofte uzata vorto „kunveno“ kaj „kunveni“, „vortoj kunmetitaj“ (Fundamento § 11), ktp.

Dank' al la F.K. la malkorekta vorto „forlasi“ en la senco de „verlassen“ (A.: to leave, F.: quitter) enradikiĝis en Esperanto. Ni havas en nia lingvo la vortojn „lasi“ kaj „for“, kies sencoj estas klaraj. Sekve: se mi estas kune kun mia amiko, lin komence retenas, kiam li volas foriri, kaj fine „permesas ke li foriru“, mi lin „forlasas“; sed se mi iras for de li, mi lin ne „forlasas“, sed mi lin „postlasas“.

En sia Parolado je la malfermo de la Sepa Kongreso, nia Majstro klarigis ke Volapük devis perei nur pro tio ke la enkonduko de ĉiu nova vorto aŭ esprimo nepre dependis de la aprobo aŭ arbitreco de la elpensinto. Sciante de la komenco la danĝeron de tia sintenado, Zamenhof kiom eble plej frue „la tutan mastrecon pri Esperanto en tuta plenece transdonis al la Esperantistoj mem“. Neniam vi aŭdis de mi la vortojn: tion mi postulas aŭ tion mi deziras. Neniam mi provis altrudi al vi mian volon“, li diris je la malfermo de la Oka. Sed tiel same kiel la despoteco de Schleyer por Volapük, la troa modesto

rapidan restarigon de rilatoj kun la fremdlanda esperantistaro. Al la tutmonda samideanaro la socio esperanta en Irkutsk sendas sian fratan saluton. Adreso de la socio: str. Zverevskaja, 14, Irkutsk, Siberio.

5-a Internacia Foiro de Frankfurt a. M.

Gi okazos de 25. septembro ĝis 1. oktobro 1921. Seriozaj interesatoj petu prospektojn kaj presadojn plurlingvajn aŭ en Esperanto de Mess-ami (Esperanto-fakoj) Frankfurt a. Main, Germanio.

Lernejo.

En Locarno (Svis.).

Dum la proksima lernejo jaro la loka „Vesper-lernejo“ malfermos oficiale elementar kaj superan kursojn de Esperanto. (Tiu ĉi vesperlernejo estas oficiale moneblata de la svisa registaro.) La vesperlernejo estas ĉiujare organizata de la loka sekcio de la „Svisa Komercista Societo“.

En Nürnberg kaj Fürth (Bavario).

La Esperanto Kartelo Nürnberg-Fürth estis aranĝinta en marto kaj aprilo du grandajn publi- kajn kunvenojn en unu el la plej konataj salonejoj de Nürnberg. Dum ĉiu kunveno la ĉe- estantoj akceptis unuvoĉe rezolucion, en kiu la enkondukado de Esperanto en la lernejojn estis postulata. Tiuj ĉi rezolucioj estis ankaŭ sendataj al la urbestaro de Nürnberg, kies instruata komitato sin okupis nun tre detale pri la demando de la enkondukado de Esperanto en la urbin lernejojn. Estis decidate alasi Esperanton prove kiel nedevigan fakon en la superaj klasoj de la profesiaj pliperfektigaj lernejoj kaj de la superaj knabinlernejoj. — La esp. klasoj, starigitaj kaj subtenataj de la urbo ĉe la popolaj klerigaj kursoj, restas.

Ankaŭ la urbestaro de Fürth permesis la instruadon de Esperanto kiel ne deviga fakoj en la profesiaj pliperfektigaj lernejoj prove por la instrua jaro 1921/22.

Tra la Mondo.

En la jaro 1920 Usono produktis 32 548 000 tunojn da pretaj komercaĵoj el fero kaj ŝtalo, tio signifas rilate la antaŭan jaron plion de 7246 000 tunoj.

Chicago Tribune sciigas el Washington, ke la amerikaj reprezentantoj por la konferenco de la internaciaj komercaj ĉambroj (27. junio) ricevis la komision proponi la formadon de konstanta internacia komitato, kiu sin okupu pri la forigo de la nuntempaj malfacilaĵoj en la internacia rekonstruado.

Lastan lundon tagmeze okazis en minejo Mont Cenis apud Herne en Germanio terura eks- plosio. Gis mardo vespere oni trovis 80 mort- igitajn kaj multajn difektitojn.

La situacio en Supra Silezio restas neklara kaj netolerebla. Estus dezirindege, ke tiu grava problemoj estu fine solvata.

Sporto.

Vetciklado en Amsterdam.

La vetciklado en Amsterdam la 19-an de junio havis jenan rezulton: 25 km-ciklado 1. Bleke- molen 25:19, 2. Vermeer 200 m, 3. Storm 2 rondoj, 4. Saldow; 40 km-ciklado 1. Blekemolen 37:07, 6, 2. Saldow 80 m, 3. Vermeer 5 km, 4. Storm. Finrezultato: 1. Blekemolen 2 pt., 2. Vermeer 5 pt., 3. Saldow 6 pt., 4. Storm 7 pt.

eco de Zamenhof, laŭ mia opinio, estas danĝero por Esperanto. La ĝusta vojo devas troviĝi en la mezo! Ju pli multe da vortoj kaj esprimoj oni scipovas de nacia lingvo, des pli bone estas. Sed en Esperanto oni provas sian eminentecon, se oni kapablas esprimi siajn ideojn uzante kiom eble plej malmulte da novaj radikoj, ĉar ne estas pruvo de Esperanta scipovo apliki pli aŭ malpli internaciajn vortojn en Esperanta fonetika orto- grafio! Sed anstataŭ ol garantiĝi vere Esperantan esprimmanieron, malhelpante la troan enkondukon de novaj nenecesaj vortoj, kies ideo estas esprim- ebla per Esperantaj radikoj kaj afiksoj, la § 15 de la Fundamento ne esprimas „tion mi postulas“ aŭ „tion mi deziras“, sed ĝi tekstas: „... ĉe diversaj vortoj de unu radikoj estas pli bone uzi senŝange nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto“.

Mi iam volis esprimi Esperante la ideon de la Germana vorto „verfänglich“ (F.: „capiteux“, A.: „capitulos“). Ĉiuj Germana vorto estas derivita de „fangen“ — kapti, sed mi supozis ke tiu ĉi derivado estas „Germanismo“. Mi serĉis la respon- din vortojn en aliaj lingvoj kaj trovis 1. ke ĉiuj lingvoj derivas tiun ideon de „kapti“, kaj 2. ke „kaptioza“ estus internacia vorto laŭ § 15 de la Fundamento. Kvankam do mi povus uzi „kaptio- za“, mi aplikis „kaptiema“, ĉar, laŭ mia opinio, oni povas aprobi en Esperanto la „internacian ideon“, t. e. derivi la vorton serĉatan de „kapti“, sed ne la „internacian vorton“, t. e. „kaptioza“, kvankam la unua parto de § 15 permesas la uzadon de „kaptioza“, ĉar ĉiuj vortoj estas „inter- nacia vorto“, kaj „la tiel nomataj vortoj fremdaj, t. e. tiuj kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo“.

(Daŭrigota.)

Piedpilko.

Sveda piedpilka klubo Idrottsföreningen Kam- raterna Malmö ludis kontraŭ Sportklub 99 Düssel- dorf 1:1 kaj kontraŭ Kölner Klub für Rasenspiele en Köln 2:1.

Esp. Propagando dum Sportfesto.

La 5. junio, kaŭze de la „Regna Laborista Sporttago“ en Braunschweig (Germ.), ĉe kiu estis procesio de ĉiuj sportunuigoj, partoprenis ankaŭ la laborista esp. grupo. Estis bonega propa- gando. Maljunuloj kaj junuloj admiris la belege ornamitan festveturilon, kiu estis sieĝita, kiam oni disdonis la flugfoliojn inter la multnombraj homoj. Sur la veturilo ni prezentis la plej diversajn naciojn. Ĉe la fino de la placo, kie okazis la gimnastikaj arangoj, ĉio estis filmata. La grupo farigis kolorajn kaj nigrajn kartojn, kiuj estas riceveblaj de O. Zehme, Marienstr. 11, pt., Braunschweig.

Alvoko.

La 18. junio fondiĝis en Varsovio la unua rondo de samideanoj, celantaj ne nur propagandi Esperanton, kiel lingvon internacian, sed ankaŭ ĝian internan ideon.

La devizo de la rondo estas „Per Esperanto al repaĉoj kaj konkordo“.

La iniciatoroj al la fondo de tiu ĉi rondo donis la artikolo de d-ro Leono Zamenhof, aperinta en „Esperanto Triumfonta“ sub la titolo „La korpo kaj animo de Esperanto“.

La nenormalaj politikaj cirkonstancoj, la sufoka atmosfero de interhomaj malamo metas sur la esperantistojn, kies celo nepre devas esti la inter- proksimiĝo de l' homaro, la devon subteni ĉion, kio hodiaŭ povas celi la repaĉojn de popoloj.

La nomo de la rondo estas „Konkordo“. Ĝia plej proksima celo estas fondi similajn rondojn en diversaj partoj de la terglobo por kune el- labori la agmanieron kaj precizigi la programon. Jam el Anglujo kaj Francujo venis la unuaj sci- goj, ke tie inter la esperantistoj fondiĝis samcelaj grupoj. La varsoviaj konkordanoj petas ĉiujn samideanojn, por kiuj kara estas la ideo de inter- paĉio, turni sin al la sekretario de Varsovia rondo (d-ro Paulina Muszkatblat, Warszawa, Krochmalna 15), kiu volonte donos ĉiujn necesajn sciigojn, koncordanajn la konkordanojn en la tuta mondo.

Prezidanto: d-ro Wilhelm Robin.

Sekretariino: d-ro Paulina Muszkatblat.

Aoranoj

vizitontaj la XIII-an en Praha, sendu tuj vian adreson al s-o F. Švingr, Bukovsko 78, Res- publiko Ĉeĥoslovaka.

Al polaj abonantoj

ni sciigas, ke pro la granda daŭra malaltiĝo de la pola valuto, ni devas estonte kalkuli 10 pol. mk. po numero.

Ĉiun monsumon oni sendu ne al la eldonejo en Köln-Horrem, sed ĉiam al nia reprezentanto s-o Adolf Oberotman en Warszawa.

Opa vendado de ET.

Aĉetejoj en Budapeŝt:

S-o Balkanyi, Hajos u. 15-12.
Laborista Esp. Societo, Ferenc ter. 1.
Dum grupkunvenoj en Socia Muzeo, VI, Eötvös u. 5.
Dum grupkunveno en Kafejo Kovacs, Oktogon- placo.
Librovendejo „A Nap“, VI, Terež körut 9.
Librovendejo Kokai, IV, Kammermayer Karoly u. 5.
Tabak- kaj gazejvendejo, VI, Andrássy ut. 55.

Gazetaro.

La maĵo kajero de la revuo de TOURING CLUB DE FRANCE (la plej grava turista asocio) enhavas noton pri la decido de la pariza komerca ĉambro kaj de la deziresprimo de akademianoj.
La semajna revuo PROGRES CIVIQUE (Paris) de 18. junio enhavas la deziresprimon de 21 akademianoj.
La gazeto de francaj policistoj LA VOIX DES POLICES (La voĉo de polico) publikigis en la n-ro de 15. marto poresperantan artikolon de s-o Migulière, polica inspektoro de la Pariza policiprefektejo (lia adreso: s-o Migulière, Préfecture de Police, Renseignements généraux, Paris). Responde en la n-ro de 18. junio estis presita artikolo de nova fervora esperantisto Combes helpe polica foto- grafisto en Touring.
VOZ DO GRAPHICO. Fortaleza (Ceara, Brazilio). 1. maio. Enhavas rezolucion de la Laborista Federacio de Ceara por Esperanto.

Recenzejo.

LIBROJ.

DOKUMENTOJ DE ESPERANTO. Informilo pri la historio kaj organizo de la Esperanta movado. Kunmetita de d-ro A. Moebusz, Lübeck (Germ.). 200 p. 12 1/2: 18 cm. Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin S. 59. Prezo: bonege kartonita 24 mk.

La apero de ĉi tiu grava libro estas ĝoje salutinda, kaj kiel dokumento ĝi okupas la unuan lokon inter ĉiuj verkoj en esp. lingvo, kiuj pritraktas la historion de nia movado kaj la organizon de la esperantistaro. Tia libro, destinita por la tutmonda samideanaro, ĝis nun mankis; ĉi tiu volis informi sin pri tiuj demandoj, faktaj ktp. en Esperantujo, devis aĉeti al pruntepreni diversajn verkojn kaj malmovajn gazetojn por ekscii tion, kion d-ro Moebusz diligente kompilis kaj kunmetis en unu libro, kiu oni prave povas nomi krestomafio de la historio kaj de la organizo de Esperanto.

Ĉiu adepto de la mondhelpingvo kaj de la ideo de l' Esperantismo devas posedi ĉi tiun dokumentaron. Por propagandistoj ĝi estas bona helpilo kaj valora Vademecum (iru kun mi) por kandidatoj por esp. ekzamenoj. Sendube multaj samideanoj scipovas perfekte nian lingvon, buse kaj skribe, sed, demandite pri historiaj okazi- zintoj aŭ organizaj institucioj, ili silentas. Tial ankaŭ ĉiu esp. instruisto havigu al si kaj al siaj lernantoj ĉi tiun dokumentaron nepre atentindan kaj atentendan (kaj espreble ankaŭ atentotan).

Por montri la riceon kaj la riĉaĵojn de la libro, mi citas el la tabelo de l' enhavo: El la biografio de d-ro Zamenhof, Letero pri la deveno de Esperanto, Leopold Einstein, La unua gazeto esperantista, ĉiuj kongresparol- aĵoj de d-ro Zamenhof, (nur tre malmultaj esperantisto- konas ilin). Oficialaj institucioj, Regularo de la Lingva Komitato, Nomaro de la Akademianoj kaj L. K-anoj, Esperantista Centra Oficejo, Pri internacia organizacio de Esperanto, Statuto de UEA ktp. — Krom tio la libro preparas kelkajn lingvajn demandojn kaj donas trafajn argumentojn por refuti la aĉajn atakojn de niaj konkur- uitoj kaj konkurantoj. — Mi trovis kelkajn preseraĵojn kaj malkorektaĵojn.

Estas la deziro de la kompilinto, ke la venontaj eldonej- estu pliriĝitaj. Li tial petas la samideanojn, ke ili, bonvole sciigu al li siajn dezirojn pri akcepto de artikolo aŭ dokumento.

Flugu tra Esperantujo, dokumentaro, kaj havigu al vi multajn amikojn! (G. Ajul.)

SVENSK-ESPERANTISK ORDBOK (sveda-esperanta vorto- ro) de G. H. Backman. 12:18 cm. 216 p. ĝi kovrilas. Broŝurita. Eldonejo Förläggningen Esperanto, Stock- holm 1. Praktike- aranĝita kaj bone presita povsfortaro. Prezo ne montriĝas.

PRAGA. Mi ricevis svedlingvan prospekton de Sveda Esp. Federacio invitantan (ankaŭ neesperantistojn) al partoprenado je karavano al Praha, ĉar por vidoj pro- ilia alta valuto la vizito al Praha estas ne tre kosta.

KANTARETO. Kunmetis Valc. 16 p. 5 1/2: 4 1/2 cm. Esper- anto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin S. 59. Prezo: karton- ita 0,70 mk. + 20% T. (multekosteca aliĝo).

Tiu ĉi kantareto por la vesperto enhavas 15 kantojn, t. e. 15 germanajn popolkantojn (en Esperanto), la „Esperon“ kaj la „Tagigon“. — Sur paĝo 8 mi trovis preseranon, alian anstataŭ alian. En la kanto sur paĝo 10 mi anstataŭis forigo per forto, ktp. — Pro ĝia ececo kaj maldikeco la libreto estas senpene kunportebila kaj tial praktike uzebila por migrantoj. (G. Ajul.)

FUNDAMENTA GRAMATIKO DE ESPERANTO, de d-ro P. C. Monti. Eldonis: Itala Katedro de Esperanto, Milano. Via Rossari 2. 70 p. 15:19 cm. Prezo ne montriĝas. (Nur en Esperanto skribita libro.)

MIZERO KAJ SUFEREGO DE LA NURNBERGAJ INFANOJ.

Broŝuro eldonita laŭ mandato de la urbkonsilantaro kaj prilaborita en la statistika oficejo. En lingvo Esperanto. Formato 16 1/2: 25 cm. 24 p. ĝi antaŭpreita kovrilas. Senpage havebla por eksterlandanoj de prof. d-ro Lederer, Nürnberg, Germ., Tuchergartenstr. 18.

GAZETOJ.

BULGARA ESPERANTISTO. Majo.

ESPERANTO. Junio. 32-paĝa, riĉenhava. Speciale interesaj artikoloj: Kiam gazetaron ni bezonas, de G. C., kaj Pri Landnomoj, de B. Privat.

ESPERANTO-GAZETA. Tomsk, Siberio. N-oj 1 kaj 2 de febr. kaj marto 1921. Prezo po n-o 50 rubl. Unu- paĝa gazeto en rusa kaj esp. lingvoj, presita sur pek- papero.

FRANCA ESPERANTISTO. Junio. Raporto pri la Nacia Kongreso en Orléans. — Literatur- aĵoj. — Kroniko ktp.

HUNGARA ESPERANTISTO. Junio.

LA MARTO. Junio. Kun ilustritaj artikoloj pri Bodenbach, Tetschen kaj Leimeritz.

Parolejo.

92.

Pri la respondo de la komerca ĉambro de Budapeŝt (vidu ET n-o 54).

Mi legis kun granda intereso la artikolon pri la respondo de la komerca kaj industria ĉambro de Budapeŝt pri Esperanto. Tiu respondo estas absolute segaca, kaj tiu de la lerneja direktoraro tute ne. Ke ĉi ajn komercisto aŭ industristo tiel parolu, oni tute laŭvorte kompensas; sed tiu rezonado en la buŝo de ĉi ajn lernejestro ne estas akceptebla.

Ĉi devas doni ekzemplon, kiam la novelo aperas en la instruplano, kiel en ĉi ajn alia afero! Ĉi tiu unu devo estas s-i u ĉi tiuj novaj, kontrolaj ĝian pravecon, sin informi pri ĝia utileco, ĝia uzado en ĉiuj fakoj kaj post tiuj klarigoj iniciati ekprovon.

Certe tiu lernejestro ne legas „Esperanton“ de UEA aŭ „ET“; ĉar li estus vidinta la antaŭeniradon de Esperanto en la komercaj rondoj, absolute mirigan post la milito; kaj ja diras niaj eminentuloj, Esperanto nur disvastigos per la komercio.

Ĉu, kiam la telefono aperis, la direktoro same rezonadis kiel la lernejestro kaj diris: „Miaj oficeistoj lernas uzo de telefono, kiam la tute komercistaro ĝin abonos?“ Mi petas diri al mi, kiam kvalifikon oni estus doninta al la rezonado de tiu direktoro. Do, ekzemploj kaj iniciatoj propagandi novajn devas deveni el tiuj, kiuj devigas ĝian utiligon kaj ĝin instrui, ĉu ne vere?

Mi profitas ankoraŭ de la okazo por diri al niaj aka- demianoj, ke la disvastigo de Esperanto estas tiel sukce- esa en la komercaj fakoj, ke tre proksime la komercistoj kaj industristoj bezonas teknikajn vortarojn, kiuj ne ek- mentaj kreadoj de tiuj komercistoj. La esararo de la specimena foiro de Frankfurt elmontris al ni la neceson de tiuj teknikaj vortaroj. (L. Méras, Paris.)

93.

S-o aŭ S-o?

Preskati ĉiuj samideanoj kaj ankaŭ la plej granda parto de nia esp. gazetaro uzas por la vorto Sinjoro la mal- longigon S-ro, logike oni devus nun ankaŭ skribi por Sinjorino S-rino, sed oni skribas S-ino. Kiel mi rimarkis, kelkaj malmovaj esperantistoj komencas uzi nur la mal- longigon S-o, kaj ankaŭ tute prave. Do ni skribu plue S-o kaj S-ino! Ni montru tiel, ke nia lingvo estas logika ĉiunmaniere! (Prengel, Bydgoszcz.)

Rim. de Red.: Tute konsentante pri la propono de S-o Pr., ni tuj post ricevo de lia „parolo“ ĉesis uzadi S-ro kaj estonte ĉiam uzados S-o, pro logikeco, simpla kaj ŝpar- emo; same ni nun mallongigas numero n-o anstataŭ n-ro.

94.

Rilatas al parolo 75, pri la vorto „agnoski“.

Mi tute konsentas kun s-o Stuart-Menteth, ke agnoski estas konfuziga vorto, ĉar angle agnoskito signifas „iu kiu neas ke ni scias aŭ povas scii Dion“. Do vi tuj vidas, ke ne estas bone uzi „agnoski“ por la ideo, ke „oni konfesa akceptas ktp.“, kaj laŭ mi estas preferinde uzi kiel radikojn por tiu ideo „reĝni“ aŭ „reĝnigi“ de la vorto „incognito“ jam multe uzata en nia lingvo. En la angla lingvo trovi- gas la vorto „recognize“ (reĝnigi), kiu, laŭ mi opinio, la esperantistoj devus uzadi. (E. E. Yelland.)

Anoncetoj.

(Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj kostas por dufoja enpresado la samon kiel kvin numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresado kostas la duoblon.)

ESPERANTISTOJ EN PARIZO. Hispana samideano bezonas malgrandan, ne meblitan loĝejon en Parizo aŭ ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Ankaŭ li serĉas laboron kiel lignaisto. La pasintan jaron li loĝis en Parizo kaj parolas francan lingvon. Se iu afabla kamarado povas ĝin oferti al li, scigu ĝin al jenaj adresoj: Marguerite Petit, 26 Boulevard de la Chapelle, 10 arr., Paris, aŭ s-o Johano Compté, strato Lazareto 52, Barcelona, Hispanio.

NOVA ADRESO. Ni komunikas, ke ni transloĝiĝis al Bydgoszcz. Nia nuna adreso estas: Fratoj Feihke, Bydgoszcz, Polio, ul. Petersona 11.

INTERŝANĜO. Kiu havigos al mi ekzempleron de „La Interrompita Kanio“ de Kabe, al tiu mi sendos ekzempleron de mia ĵus aperinta libro: „Germanaj Kanioj Esperantigitaj“, Friedrich Pillath, Essen (Germ.), Ortrud-Sir. 48.

PETO. 2 junaj antverpenaj instruistoj deziras migri per biciklo tra Germanio al Ĉeĥoslovakio dum sia granda libertempo (aŭgusto-septembro). Volontege ili loĝus unu nokton de diferenca samideanoj dum la migradoj. Kiuj bonvolus akcepti ilin, estas alieble petataj skribi al s-o Fr. Loiry, Wilrycksche vest 76, Antverpeno, Belgio.

STUDENTINO de Universitato, kiu intencas partopreni la Kongreson en Praha, deziras dum la kongreso malmultekostan loĝejon de esp. familio aŭ de kolemino. Ofertojn peras la redakcio de ET.

TRAVEJURONTAJ fremdlandaj samideanoj estas ĉe mi gasteme akceptitaj kaj povas ĉe mi senpage fraktili. B. Wachowski, Essen-Dellwig, Krainbruchstr. 65a (Germanujo).

Korespondo kaj Interŝanĝo.

(Dufoja enpresado kostas la samon kiel tri numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresado kostas la duoblon.)

V. Mislinas, Kalsedorsy (Litovujo), Vilnius kontr. Zvalguj Delis, interŝanĝas ilust. poŝtkartojn kaj lerojn nur kun fraŭlinoj.

Anton Theile, Düsseldorf (Germ.). Johannisstr. 18, deziras korespondi per poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Peter Denner, Düsseldorf (Germ.). Färberstr. 118, deziras korespondi kun s-anoj ĉiulandaj.

S-o Max van der Gracht, Düsseldorf (Germ.). Friedrichstr. 15-18, deziras korespondi per ilust. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn; ĉiam respondos.

Fraŭlo Jozefo Benagaz, Esp. Grupo, Centro de Dependientes, str. Predo 61, Habana, Kuba insulo, deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj per ilust. poŝtkartoj kaj lerojn pri ĉiu afero. Mi ĉiam kaj tuj respondos.

S-o Konrado Doménech (elp. Domenek), instruisto, Rambla Alvarez 12, Girona (Hispanujo), deziras korespondi kun ĉiulandanoj, precipe fraŭlinoj, per leroj kaj ilust. poŝtkartoj.

Ĉeĥoslovakio, Praha VIII - 1079, s-o J. Mikš, oficisto, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o J. Oulehla, adm. oficisto en Skrivany apud Novy Bydžov (Boĥemio), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun Rusio, Ukrainio, Polio, Estonio, Litovio, Letonio, Danio, Islando, ĉiuj germanaj plebsciistoj. Württemberg, de ordinarij ĝis pli altaj valoroj, po 1 ĝis 10 de ĉiu speco laŭ katalogo Michel 1920.

S-o S. B. Risku, Mieto, Finnlando, deziras korespondi kun la tuta mondo; ĉiam respondas.

S-o Lauri Teini, Lähla, Finnlando, nur interŝanĝas poŝtmarkojn.

M-of. B. Givdra, Litovio, Velk. armija 1-os p. Divízijs štabas, deziras korespondi per artoj poŝtkartoj kaj lerojn pri la studenta vivo en ĉiuj landoj. Laŭ volo interŝanĝas ilust. poŝtkartojn je litovaj poŝtmarkoj. Ĉiam respondos.

Aleksandr Samojlov, Shornaja 9a, Simbirsk, Rusio, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn, pk. ilust. kaj lerojn kun la tuta mondo.

S-o Josef Wawrzynski, Bydgoszcz, Polio, ul. Ryterska 5, deziras korespondi kun fraŭlinoj kaj sinjoroj per ilust. poŝtkartoj kaj lerojn kun ĉiuj landoj.

Kiu deziras aĉeti malĉerajn poŝtmarkojn de „Flume“, Jugoslavio, Litovio kaj Polio, aŭ interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papernonon, bonvolu skribi al s-o L. Galinski, Sobieskiego 5, Białystok, Polio.

Lwów (Polio), str. Sw. Zofii 44, s-o Fr. Zachariasiewicz, liveras 100 malsamajn poŝtmarkojn poŝt per sendo de 5 sv. fk., 200 poŝt. pol. per sendo de 25 sv. fk.; aŭstrajn kaj germanajn kun subskribo Poczta Polska, plebsci, ruĝa kruco ktp., ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn laŭ katalogo de Michel 1920.

Samuel Ripp, Białystok, Polujo, Fabryczna 5, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papernonon kun samideanoj.

Hermann Theobald, Altona-Steenkamp, im Haag 18, Germ., deziras korespondi per leroj kaj poŝtkartoj ilust. kaj kun eksterŝtatanaj kaj anoj de novaj ŝtatoj.

Kongresanoj. Mi deziras korespondadi kun junaj fraŭlinoj, kiuj partoprenas la XIII-an kongreson en Praha. D-o Karlo Mezel, VI, Terež-kúrti 4-III-7, Budapeŝt, Hungario.

S-o Camillo Verstrepen, instruisto, Belgio, Antverpeno, Wilrycksche vest 76, deziras korespondi per leroj kaj poŝtkartoj ilust., precipe kun Germanujo kaj Ĉeĥoslovakio; ĉiam respondos.

S-o E. Friebe, instruisto, del. de UEA, Dresden-Dobritz, Residenzstr. 24, I., serĉas gekorespondemulojn en la tuta mondo. (Leroj pri ĉiu temo, il. poŝtkartoj de vidindaĵoj, de la popolo vivo.) Donas informojn pri komercado kaj industrio en sia regiono. Preferas neinterromptan korespondadon.

S-o Lois Bauer, oficisto, Glashütte, Ichenhof, Bez. Köln, Germ., deziras korespondi per leroj kaj poŝtkartoj kun ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj.

Mi deziras interŝanĝi ilust. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Ernst Rinkowski, Berlin-Neukölln, Weserstr. 177, Germ.

Junuloj. Por kurso de junaj gesinjoroj, 18-20 jara, mi petas alsendadon de poŝtkartoj ilust., esperantaĵoj, gazetoj ktp. kiel vigiligilo. Alilandaj komencantoj, lernantoj estas petataj doni sian adreson por korespondado. Hermann Theobald, Altona-Steenkamp, im Haag 18, Germanio.

S-o Paul Becher, poŝtoficisto, Köln, Germ., Burgunderstr. 7, deziras korespondi per leroj kaj poŝtkartoj kun gesamideanoj en ĉiuj landoj.

Grueŝtro Leo Fiedler, Schillerstr. 15, III., Breslau 15, Germ., kaj 40 fervoregaj novuloj deziras interŝanĝi kun ĉiuj landoj poŝtkartojn ilust., poŝtmarkojn ktp. Tuj kaj la tutan jaron ĉiam ili respondos.

SILKAJ BRODAĴOJ

REKTE EL ĤINUJO.
. LA SILKOLANDO!

Esperanto-brodaĵo kun surskriboj esperantaj, verda stelo, globo ktp.

Biblijaj brodaĵoj kun sanktaj tekstoj.

15:20 aŭ 29:39 cm • dol. 2.50 aŭ 4.50.

Brodaĵoj de birdoj, floroj, vidaĵoj ktp. samformataj kaj samprezaj.

Specialaj laboroj laŭ modelo.

Sendo per rekomendita letero.

Dol. 1.00 = 10 stamp. respond.-kup. aŭ 5 ŝilingoj, poŝtmandatoj aŭambio de Thos. Cook & Son.

Specimeno kontraŭ 1 resp.-kup.

C. S. Gee,
HAI-YEN (tra Shanghai), Ĥinujo.

Korespondado en Esperanto!

EN- KAJ EKSTERLANDAJ MINERALOJ

unuopaj pecoj kaj kolektaĵoj,
krudaĵoj kaj facetitaj brilantaj
estas prezinde liverataj de

Magazeno de mineraloj
A. Jahn, Plauen i. V. (Germ.)
Ob. Graben 9.

Eksterlandaj liverantoj serĉataj.

Pauls Verlag Graz (Aust.)

Karmeliterplatz 5

estas havebla:

Kiel oni fondas kaj organizas Esperantan grupon? de Hanns Sappl, ĉefsekr. de Moka. 28 paĝoj kaj kovrilo. Prezo 1½ Sm laŭ nacia valuto (por Aŭstrujo 10 kronoj, por Germanujo 5 mk., por Svisujo 1 sv. fk.). La prez. de UEA s-o Steiner skribis: „La broŝuro estas rekomendinda el ĉiuj vidpunktoj.“ Ĉar la unua eldono baldaŭ estas elĉerpiata, ni rekomendas baldaŭnan aĉeton de tiu utila libreto.

Esperanta Gvidlibro tra Graz. 80 paĝoj. Prezo 1 Sm. Ni rekomendas precipe al la estontaj kongresanoj de la VII-a aĉeton de tiu bele ilustrita gvidlibro.

Esperanta lingva kaj ekzerca libro de dir. Josef Schamaneck (germanlingve). Dua eldono, plibonigita. Prezo 50 aŭstr. kronoj, 6 germ. mk., 1 fk. sv. Enhavas ankaŭ la plej gravajn katolikajn preĝojn aprobitajn.

Plue estas haveblaj lka-sigelmorkoj, leterpapiro, koloraj kartoj de la Centra Adm. Oficejo kaj kovertoj kaj ĉia Esperanta literaturo. Prezoj laŭ demando.

Filatelistoj! Novaĵo!

Ĝus aperintaj konstituciaj polaj poŝtmarkoj, belega eldono, same 50 diversaj antikvaj maloftaj poŝtmark-kompletoj da diversspecaj polaj; same ukrainaj, Petlura, rusaj jubileaj Romanoff, de generalo Judenij, kontraŭ-batalanto de Bolŝevikoj, rusaj sovjetaj, kaj aperintaj poŝtmarkoj de Litva Srod-kova, de generalo Zeligovski. Ankaŭ malnovaj moneroj. Liverado al seriozaj pograndaj filatelistoj. La pago per respond-kuponoj, bankbiletoj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj.

Adolfo Oberrotman, Varsovio,
Krak-Prz. 10.

ARGENTINIO.

bonege dum 7 jaroj kun la tieaj ekonomiaj cirkonstancoj. Post kelkmonata restado ĉi tie reveturis Argentinon, trapasante okcident- kaj nordokcident-eŭropajn landojn. Absolutaj moralaj-materiaj garantioj. Adreso ĝis la XIII-a: L. Kelety, Szászsebes (Sebesul Sasesc), Transilvanio, Rumanio; poste: Kelety-Martelli, c. Caseros 528, Buenos-Aires, Argentino.

Spertaj Esperantistoj el ĉiuj landoj

serĉataj kiel pagotaj helpantoj por la eksterlanda organizo de eldonejo de eksport-adreslibroj.



Estas en preparo:

Eksport-Adreslibroj

de la germana elektro-industrio
2 volumoj, 5-lingvaj,
de la germana industrio de metal-artikloj
4-lingve,
de la germana industrio de delikata metaloj
(bijuterio, or- kaj arĝentaĵoj) 4-lingve,
de la germana industrio de ludiloj, 4-lingve,
de la tuta industrio de maŝinoj kaj
instrumentoj, 6-lingve.

Jam mendebla estas:

Eksport-adreslibro de la led-industrio
de Offenbach, 4-lingve.

Seriozajn ofertojn kun detaloj (Esperanto korespondata) sendu al:

Auslands-Werbe-Dienst
Kaiser Wilhelm Passage 18,
Frankfurt a. Main (Germ.).

O. Sklenčka, Delegito de UEA, Hradec Králové Ĉeĥoslovakio

peras kaj prizorgas ĉiuspecajn aferojn kaj rilatojn: komercajn, informajn, interŝanĝajn ktp.

inter fremdlando kaj Ĉeĥoslovakio.

Bonvolu uzi miajn fidindajn servojn!

KOMERCISTA ESPERANTO-GRUPO

Freiburg i. Br., Katharinenstr. 14

peras ĉiuspecajn negocojn. — Rilatoj al gravaj germanaj firmoj. Perado senkoste. Uzu niajn servojn!

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof kaj la funebra ceremonio.

Valora memoraĵo por ĉiu esperantisto.

Presita sur alta papero.

Kun 12 ilustraĵoj laŭ originalaj fotografaĵoj. (Funebra procesio sur strato Teatralna. — Sur la Tombejo. — Enterigo de la ĉerko. — Paroladoj de la predikanto d-ro Poznanski, de s-ano Grahowski kaj de majoro Neubarth. — La tombo, novaj fotoj de aprilo 1921.)

Prezo de la verketo 2 sv. sv. fk., 15 germ. mk. Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“, Köln-Horrem.